N-o 4. 1935. 18. VI.

# BULTENO
## DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

Redakcio kaj administracio: Praha XIX., Uralské nám. 447. Telefona n-ro 718-41.
Redaktas: Dr. ST. KAMARYT, Dr. A. PITLÍK, O. GINZ.
Senpage por membroj de Ĉs. Asocio Esperantista. Aperas sesfoje dum la jaro.

SAMIDEANOJ!

## Kongreso de esperantistoj de Ĉeĥoslovaka respubliko

estas kunvokata en la ĉefurbon de la Moravi-silezia lando Brno. Ĝi okazos 27-an — 29-an de septembro 1935. Estos en ĝi diskutataj ĉiuj aktualaj temoj de la movado kaj deklaritaj la finaj decidoj pri la enlanda unuecigo. Partoprenu grandnombre! Jam nun anoncu vin ĉe la loka kongresa komitato en Brno, kiu jam estas kreita. (Provizora adreso: Josef Vondroušek en Brno, N. Černovice, Školní 69.) La kongresa kotizo estas 14 Kč. Estos prizorgataj diversaj faciligoj kaj rabatoj por la kongresanoj.

## XXVII-a Universala Kongreso de Esperanto

en Roma-Firenze-Napoli daŭranta de la 3-a ĝis 10-a, por la ekskursantoj eventuale ĝis 17-a de aŭgusto, promesas esti granda manifestacio por nia lingvo en Italio. La kunsidoj okazos en la nomitaj tri urboj, sed la kongresanoj havos okazon vidi dum la ekskursoj kaj dum la unika vaporŝipa krozado ankoraŭ pliajn famajn lokojn de bela Sudo. Vizitataj estos ankaŭ afrikaj kolonioj italaj.

La grandiozaj aranĝoj de la nunjara kongreso faros la partoprenon unika ĝuo. Aliĝu kaj invitu ankaŭ viajn neesperantistajn amikojn. Travivu en internacia societo samideana neforgeseblajn tagojn sub blua ĉielo itala!

En propra intereso anoncu vin plej rapide ĉe la Esperanto-Centro Itala, Galleria Vittorio Emanuele 92, Milano.

## Oficialaj ekzamenoj pri esperanto.

En novembro 1935 oni povos lastan fojon fari oficialan („ŝtatan") ekzamenon de instruisto pri esperanto laŭ la ĝisnuna sistemo de ekzamenoj. Depost januaro 1936 ekvalidos ministeria dekreto pri novaj sistemo kaj metodo de ekzamenoj por instruistoj de popolaj kaj burĝaj lernejoj, en kiu ĝis nun esperanto kiel ekzamen-fako ne enestas.

Tial nia ĝenerala kunveno decidis turni sin al ĉiuj esperantistoj, kiuj estas kapablaj pri tio, ke ili faru la ekzamenon en tiu ĉi lasta termino, por ke ni povu dokumenti, ke efektive estas por tiaj ekzamenoj intereso. Kompreneble temas unusole pri seriozaj kandidatoj, kiuj efektive funde konas la lingvon kaj sufiĉe ĝian teorion kaj praktikon, kaj estas kapablaj efektive instrui en lernejo. Tial ni turnas nin precipe al samideanoj, kiuj estas instruistoj aŭ profesoroj aŭ posedas almenaŭ maturec-ekzamenon aŭ egalvaloran diplomon. Ili faru la klopodon kaj aliĝu al la ekzameno. La aliĝoj estas sendataj al unu el la komisionoj, ĉe kiuj ekzistas ekzamenanto por esperanto. Ilia adreso estas por ĉeĥoslovaka lingvo: Zkušební komise pro učitele obecných a měšťanských škol en Praha, Brno, Bratislava, Moravská Ostrava. Por germana lingvo: Prüfungskommission für Volks- und Bürgerschulen en Praha, Brno, Bratislava, Reichenberg. Sur la adreso aldonu post la nomo de la urbo: Učitelský ústav (Lehrerbildungsanstalt).

# Lokaj informoj.

*Aŝ.* EK. aranĝis la 15. XII. 1934 Zamenhof-vesperon. — La ĝen. kunv. 26. I. reelektis prez. R. Hollerung, sekr. A. Pfeifer, kas. J. Singer. — La 10. II. ekskurso al Hazlov. 7. IV. kaj 5. V. surlimaj kunvenoj en Grün kaj sur Hohenstein de ĉeĥoslovakaj kaj saksaj samideanoj.

*Bakov.* En nova kurso instruas J. Horák.

*Bor u České Lípy.* Ĝen. kunv. de la grupo „Ĉiam antaŭen" la 29. I. en gastejo „Hubertus", elektis prez. R. Schossig, sekr-inon E. Pötzl.

*Brno.* 4. IV. ĝen. kunv. de la Klubo de katolikaj esp-istoj. Prez. Aleš Berka. sekret. A. Šlapeta. kas. F. Kachlík, bibl. J. Berková, spirita konsilanto J. Meixner.

*Česká Lípa.* La 1. X. komenciĝis kurso gvidita de Kühnel. En jarkunv. 24. I. estis elektita jena estraro: prez. E. Kowaržik (Ceská Lípa III., 1054), sekret. Grete Isba. La grupo kunvenas la unuan mardon de ĉiu monato.

*České Budějovice.* 3. IV. ĝen. jarkunveno de EK „La Progreso". Esperanta Turista Inform-Servo por travojaĝantaj samideanoj estas malfermita ĉiu-labortage de la 11a ĝis 13a kaj 17a ĝis 19a h. en strato Schneiderova n-ro 256. Nova komitato: prez. V. Fiala, vicprez. J. Brousil, II-a vicprez. A. Moravec, sekr. Jos. Ploss, II-a sekr. Ferd. Rejlík, kas. K. Hofhansel, vickas. Vojt. Dolejš, bibl. St. Martinovský. La du kursojn aranĝitajn depost 1. X. 1934 kaj 7. II. 1935 partoprenis 20 p., nun daŭras kurso por progresintoj. Instruas J. Ploss. EK. petas sendon de ĉiuspeca propaganda materialo.

*Děčín-Podmokly.* En grupejo (restoracio „Bürgerstübl") okazis la 19. XII. Zamenhof-festo. — La 13. III. en jarkunv. la grupo elektis prez. Klinger, sekret. Roppert. — La grupo decidis festi nunjare la 25-jaran jubileon.

*Dolní Bousov.* En popola lernejo ĉiumerkrede instruas faka instruisto Alois Bobek.

*Fryštát.* Laborkunveno de REL 14. IV.

*Gelnice.* Ĉi tiea burĝa lernejo eldonas gazeton por siaj lernantoj, en kiu estas esperanto-kurso.

*Hluk u Uher. Hradiště.* Esperantista Rondeto aranĝis 16. III. je fino de la kurso, gvidita de Omelka, amuzan vesperon kun helpo de la membroj de Slovaka Esperanto klubo en Uh. Hradiště. Riĉa programo; precipe plaĉis naciaj dancoj de knabinoj, kiujn instruis al ili instr. Kolečkářová, magiaj ĵonglistaĵoj de Petroj kaj unuakta teatraĵo de Pospíšek.

*Holešov.* Ĝen. kunveno 31. III. elektis: prez. prof. M. Růžička, vicprez. J. Navrátil, sekret. A. Kračmarová, kas. F. Galeta, blibliot. F. Vodňanský, reviz. A. Matulíková kaj M. Konečná. Kurson laŭ Gaja lernolibro depost 25. XI. kun 10 p. gvidas prof. F. Růžička. Radio-kurso el Brno senteble helpis la lokan movadon. Ĝiaj aŭskultintoj daŭrigas nun sian studon en kurso de prof. Růžička.

*Horní Bojanovice apud Brno.* Fine de februaro okazis ekspozicio en lernejo, kiun vizitis pli ol 120 p. Regulaj kunvenoj ĉiumonate.

*Horní Rokytnice.* Ĉe hotelo Heinzel kaj en popola legejo estas fiksitaj varbkestetoj kun propaganda materialo, kiun prizorgas Raimund Krause.

*Hradec Králové.* Ĝen. jarkunveno la 27. II. Estas elektitaj prez. Šneiberg, vicprez. D-ro Weiner, sekr. Hutař, bibl. Vejnar. La biblioteko enhavas 327 volumojn. Kurso laŭ Ĉe-metodo estas preparata. — EK. en sia ĝen. jarkunveno decidis, kontribui por arta fenestro ĉe la tombo de Komenský en Naarden per Kč 100.—.

*Chrastava.* 11. II. ĝen. kunv. de „Verda Stelo". Nova komitato: prez. R. Scholze, vicprez. R. Kirsch, sekret. A. Karl, kas. G. Maruschka.

*Jablonec nad Nisou.* La 6. III. en ĝen. jarkunveno estis elektita jena estraro: prez. D-ro J. Pontz, vicprez. Franz Hub, sekret. Franz Keil, kas. E. Mai.

*Jáchymov.* 26. II. ĉefkunveno de la Esperanto-Grupo. 19. III. komenciĝis kun 20 p. nova kurso por komencantoj, senpaga por senlaboruloj. Gvidas Rudolf Perthold, ŝtate ekzamenita instruisto de esp. La Loka Lerneja komitato disponigis senpage lernejan ĉambron. Lokaj gazetoj raportas regule pri esperanto.

*Kostelec nad Orlicí.* La regiona ekspozicio havas esperantan fakon.

*Krnov.* Ĝen. kunv. 20. II. elektis prez. s-inon Rotter-Waschmann, sekret. W. Tandler; pluaj estraranoj: Wollmann, Hansmann, Wallach, Larisch, s-ino Kretschmer k. a. Komence de marto finiĝis la kurso, kiun gvidis Tandler. — Ĝen. kunv. de la Germana Esperanto-Ligo en Ĉeĥoslovakio, la 21. IV. je 9-a horo en hotelo „Tiroler". Dum antaŭvespero aranĝis la Ligo amuzan vesperon samloke.

*Kutná Hora.* Ĝen. jarkunv. de EK la 15. III. je 20-a horo en restoracio „Ĉe nigra ĉevalo".

*Liberec.* Ministerio por lernejoj dekretis prof. inĝ. G. Scholze ekzamena komisario por esperanto ĉe ŝtata germana instruista instituto ĉi tiea. — „Germana Esperanto-Societo" en sia ĝen. kunv. la 25. I. elektis jenajn gvidajn funkciulojn: prez. Schüller, sekretario d-ro Gruber. La biblioteko de la klubo enhavas preskaŭ 590 librojn. — La urbestraro permesis al la esp-a grupo fiksi informan kesteton sur domon de la Tribunalo.

*Litoměřice.* Germana E.-Unuiĝo honoris en ĝen. jarkunveno, la 4. III., la 85 jaran naskiĝ-tagon de prezidanto T. G. Masaryk per parolado de f-ino Benisch kaj decidis sendi al li gratulan telegramon. Estas elektita jena estraro: prez. Prof. D-ro R. Hiekel, vicprez. D-ro Plaminek, protokol. f-ino Benisch, kas. ĉefl. Pitra. — La eksterordinaran kunvenon la 2. IV. ĉeestis Prof. Murath kiel gasto. — Kunvenoj ĉiulunde en hotelo „Stadt Rumburg".

*Maffersdorf.* 13. III. kursfina festo partoprenata de samideanoj el Jablonec n. N.

*Mladá Boleslav.* EK. aranĝis 6. III. kune kun EK. Dolní Bousov solenan vesperon je 85-jara naskiĝtaĝo do la prezidanto T. G. Masaryk. — 23. IV. parolado de J. Šustr el Praha pri japanaj skribo kaj lingvo. 7. V. parolado de K. Vrba: „Kion ni scias pri la Luno?"

*Moravská Ostrava.* El jara raporto de la Klubo de ĉeĥaj esperantistoj ni citas: Okazis 12 membraj kaj 12 komitataj kunvenoj, somere 12 ekskursoj en montaron, al radiostacio kaj al uzinoj en Svinov. — Dum pasko estis aranĝita ĉe „Děln. radiovýstava" en Mar. Hory malgranda esp. ekspozicio. — En marto aranĝis klubo publikan paroladon de Raden pri Java en „Domo de arto". Sama prelego estis farita en Instruista instituto en Slezská Ostrava. Tradukis Gadula. — 2 ĉeĥajn paroladojn pri esperanto kaj provlecionon en instruista lernejo kaj Reala lernejo faris prof. Krajc kaj Adámková. En Instruista instituto okazis ankaŭ esp. parolado pri Estonio de estono A. Birk. Tradukis Gadula. — Ĉe inaŭguro de esperanta memorŝtono en Nový Bohumín parolis por la klubo Vichnar. — Anoj de klubo gvidis 7 kursojn, 2 por progresintoj prof, inĝ. Krajc, 3 por komencantoj Slaný kaj po 1 kurso por komencantoj Chrobák kaj Gadula. — Radiostacio Mor. Ostrava sendis preskaŭ ĉiumonate esperantan prelegon, aranĝitan de la klubmembroj, en pasinta tempo eĉ ĉian duan semajnon. — En gazetaro de Mor. Ostrava aperigis la anoj dum la jaro 1934 pli ol 250 artikoletojn pri esperanto. Regule aperas ĉiudimanĉe „Esperantský koutek" en „Čes. Slovo", „Socialistický esperantista" en „Duch času" kaj ne regule malgrandaj artikoletoj en „Mor.-sl. deník". — La ĝen. kunv. elektis por la jaro 1935 jenan estraron: Prez. K. Chrobák, vicpr. Dr. Říha, sekr. prof. inĝ. J. Krajc, kas. L. Novák, bibl. K. Majtner, prot. V. Slaný, raport. O. Gadula. — En stacidomo Mor. Ostrava estis elpendigita informa tabula. Klubo aliĝis korporacie al ĈAE. — 27. IV. esp. ekspozicio en YMCA enkondukita per parolado de P. Bradáč. YMCA decidis doni dum someraj monatoj senpagan dormejon al travojaĝantaj esperantistoj, kiuj haltas en Moravská Ostrava. — La E.-Grupo donacis siajn librojn al publika biblioteko. Al la publika legejo ĝi pruntedonas esp. gazetojn. En ĝia ĝen. kunveno 6. III. estis la ĝisnuna estraro reelektita.

*Nový Bohumín.* De oktobro daŭras Ĉeh-metoda kurso sub gvido de lernejestro Adámek kaj lia filino Maria. En germana real-gimnazio parolis al la studentoj la 11-an de februaro inĝ. Vlha pri esperanto kaj ĝia interna ideo kaj f-ino Adámek prezentis provlecionon.

*Olomouc.* Ĝen. kunveno de Esperantista Societo 28. IV. nomis V. Kudela honora membro. Nova komitato: prez. Alb. Neužil, vicprez. B. Pittner, sekret. J. Staněk, kas. T. Mrázková. — Laŭ iniciato de Ant. Táborský oni intencas fondi klubon de katolikaj esperantistoj.

*Opava.* EK. okazigis la 4. III. jarkunv., en kiu la ĝisnuna gvidantaro sub la prezido de direktoro H. Jančík estis reelektita. Kunvenoj la 1-an lundon en monato je 20-a horo en la urba kafejo.

*Orlová.* EK. „EMO" en sia ĝen. kunveno elektis prez. J. Stankuš el Poruba, sekr. V. Rajnoch el Lazy. Kreiĝis redakcia rondeto, kiu eldonas ĉeĥan-esperantan gazeton „Nia celo". En Lazy en restoracio „Wechsberk" ĉiusabate je 17-a horo estas aranĝataj konversaciaj kunvenoj kun amuza programo. 28. IV. bicikla ekskurso al la radiostacio Mor. Ostrava.

*Plzeň.* EK. aranĝis 23. III. je 20-a horo en vintra verando de la restoracio „Ĉe nova poŝto" amuzan vesperon por soleni la 30-jaran datrevenon de fondiĝo de la klubo. Ĉe tiu okazo 2 membroj estis honoritaj per diplomoj por siaj 25-jara agado en la klubo. Pri historio de la klubo parolis esp-e Kubásek kaj Pražáková ĉeĥe. Unua esperantisto en Plzeň-a regiono estis kontrolisto de urba impost-oficejo Kutílek, prezidanto de la klubo nun estas supera konsilisto Inĝ. Novák. — Jubilea kunveno de EK. 30. IV. — Komuna ekskurso de esperantistoj dimanĉe 31. III. posttagmeze tra Lochotín, Košutka, Chotíkov, Krkavec, Klostermannova cesta al Plzeň. — La partoprenintoj de la lasta kurso estis tiel diligentaj, ke ili verŝajne kunludos en la teatraĵo preparita por prezentado en majo. — Nun daŭras kurso por progresintoj.

*Praha.* La grupo „Verda Stelo" en ĝen. kunv. la 31. I. honoris sian mortintan prez. Dron A. Bischitzky per rememoro kaj elektis jenan estraron: prez. Dro L. Goldberger, unua anstat. Dro K. Steiner, 2a anst. s-ino M. Witz, sekr. H. Moder, anstat. E. Mayer; pluaj komitatanoj: f-ino Schelheim, s-ino Weleminsky, f-ino Rabi, s-roj Zarboch, Storch, Dro Gottlob. Kunvenoj ĉiuĵaŭde en kafejo Urban, Václ. nám. 33 kun diversaj raportoj k. s. — La societo „Ĉeĥa Blindula Preso" aranĝos en majo ekspozicion de blindulaj preso kaj kulturo. Ĝis nun aliĝis: Ameriko, Anglujo, Belgujo, Bulgarujo, Francujo, Latvujo. Hungarujo, Germanujo, Polujo, Rusujo, Hispanujo, Turkujo. La Universala Asocio de Blindul-Organizaĵoj, kies oficiala lingvo estas esperanto, montros en aparta sekcio esp. dokumentojn el la tutmonda blindulmovado. — EK. okazigis ĝen. jarkunvenon la 22. II. El la sekr. raporto: okazis 51 membraj kunvenoj kaj ekskursoj, finiĝis 4 kaj iras 2 kursoj. La kunveno kun ĝojo konstatis fortan intereson por nia afero malgraŭ kriza tempo. Komitato preskaŭ senŝanĝe reelektita. — Jugoslavan vesperon aranĝis EK 12. IV. Lumbilda parolado de jugoslava samideano Djordje Cakič. — Ĝen. kunveno de Ligo de katolikaj esperantistoj 25. IV.

*Prostějov.* Ĝen. kunv. de EK 25. IV.

*Radvanice.* Laborkunveno de la Regiona Esperantista Ligo 17. III. Ĉeestis 43 p. el 17 lokoj. La kurso por komencantoj finiĝis 24. II., daŭrinte 5 monatojn. Je kursfino estis aranĝita amuza vespereto. La naskiĝ-jubileo de prezidanto T. G. Masaryk estis solenita per festkunveno la 6. III. — La klubo eldonas kluban gazeton „Tagiĝo" jam duan jaron.

*Rychnov nad Kněžnou.* Esperanta Unuiĝo, fondita en novembro laŭ iniciato de J. Stránský, finis en la unuaj tagoj aprilaj kurson kun 15 p.

*Slezská Ostrava.* Rondeto de ĉeĥaj esp-istoj okazigis 16. III. je 19-horo en restoracio „Šparkasa domo" jarkunvenon.

*Sloup.* Laŭ oficiala informo ĉesis ekzisti, pro manko de membroj, la loka E-grupo.

*Stonava.* L. E, S. elektis en jarkunv. 24. II. novan estraron. La grupo nombras 27 membrojn, aranĝis pasintjare 3 kursojn kaj havas bibliotekon kun 80 vol. sciencaj kaj beletristikaj, kaj standardon 120x80 cm.

*Svitavy.* La grupo „Verdstela frataro" en sia jarkunveno reelektis la malnovan estraron. Grup-kunvenoj ĉiulunde en gastejo „Hornisch".

*Tanvald.* Januare oni fondis esperantistan rondeton, en kiu kunvenas ĉiun lastan dimanĉon de la monato je 3-a h. posttagmeze en Dělnický dům. La kunvenojn ĉeestas ankaŭ esperantistoj el najbaraj lokoj.

*Teplice.* Dum Pedagoga semajno parolis laŭ instigo de GEL al 40 instruistoj B. Bräuer pri „Esperanto kaj interpaciĝo de la popoloj". Ĉeestis ankaŭ d-ro Příhoda, la fama ĉeĥoslovaka fakulo pri la modernaj instrumetodoj.

*Třinec.* Esperantisto Olaf Kristensen el Stockholmo, travojaĝanta jam 12 eŭropajn ŝtatojn, parolis ĉi tie kun esperantista laboranto s-ro Madejčík.

*Uh. Hradiště.* Slovaka Esperanto-Klubo aranĝis 30. III. kursfinan feston. — Ĝen. kunveno de la Slovaka Esperanto-Klubo 16. IV. — Prez. R. Kubíček, vicprez. R. Vilémová, E. Philadelphy, sekret. A. Křiva, kas. F. Kopřiva, bibl. J. Tichoň. La klubo decidis aliĝi korporacie al ĈAE.

*Varnsdorf.* La grupo „Zamenhof" en ĝen. kunv. la 17. I. elektis s-ron Johne prez., s-ron Wagenknecht sekretario.

*Žilina.* Ĝen. kunveno de la Esperanto-Rondeto la 25. IV. Ĉeestis 14 p. El la raportoj: Kurso finiĝis kun 15 p., kasa enhavo Kč 120·—. En 1934 la Rondeto nombris 12 membrojn, ĉiuj estas aliĝintaj al ĈAE, 2 el ili al UEA. Estas elektitaj: prez. Lud. Goldstein, sekr. G. Pick, kas. J. Waldhans. Oni decidiĝis fondi laŭstatutan klubon, fiksi informtabulon en la stacidomo, fondi bibliotekon. Komitatano de ĈAE, s-ro J. Friedrich el Košice, raportis pri la nuna stato en la movado kaj iniciatis novajn laboreblojn en Žilina kaj ĉirkaŭaĵo.

# Movado.

**Ĝen. kunveno de GEL** okazis 21. IV. en Krnov kun 48 partoprenantoj el 19 lokoj.

**Ekskurso al Bohema Paradizo** 1. V. aranĝita de la nordbohemaj kluboj ĉeĥaj kaj germanaj tre bone sukcesis, kvankam la vetero estis nefavora. Kunvenis 74 p. el 14 lokoj. Oni vizitis la belan regionon de Valdštýn, Hrubá Skála, Trosky.

**Laborkunveno de REL** 12. V. en M. Ostrava.

**La 7. VII. 1935 rendevuo de esperantistoj en Kladno!** La konataj Ekspoziciaj Foiroj de Kladno okazos tie nunjare de la 29. VII. ĝis 28. VII. La Foira komitato zorgis pri aranĝo de esperanta ekspozicio (en lernejo „U Floriána") kaj pro siaj simpatioj al nia movado nomis la 7-an de julio „Tago de esperantistoj". Estas tre dezirinde, ke venu en tiu tago al Kladno multaj gesamideanoj. Bonvolu anonci vian venon al Esperantista klubo, Kübeck 980, kiu prizorgos en loka YMCA puran liton por 6 Kč, tagmanĝon por 5 Kč, enirbileton ĉe antaŭmendo ĝis 3. VII. 4 Kč (poste 5 Kč). Diskonigu ĉie!

**Oficeja fondaĵo.** Kolekto farita laŭ decido de la ĝen. kunveno de ĈAE ĝojige progresas. Listo de la multnombraj donacintoj estos publikigita. Se vi mankas inter ili, sendu afable nun vian donacon al la postĉeka kto nro 9602 de „Svaz československých esperantistů, Praha". Ni devas havi la sumon necesan por establi bonan oficejon!

**Fina kalkulo de la V-a ĉeĥoslovaka kongreso en Olomouc.** La ciferoj de tiu finkalkulo estas nun, antaŭ la projektata kongreso, aktualaj. Tial ni publikigas ilin:

| | | |
|---|---|---|
| **Enspezoj:** | | |
| kongreskotizoj | Kč | 3.664.— |
| donacoj al la kongresa kaso | „ | 156·50 |
| Ĉe-vespero | „ | 147·— |
| Instruistoj en programo | „ | 60·— |
| | Sume Kč | 4.027·50 |
| **Elspezoj:** | | |
| presaĵoj | Kč | 1.011·35 |
| afranko | „ | 630 90 |
| kliŝo kaj stampilo | „ | 35·— |
| insignoj | „ | 338·— |
| flagoj kaj flagetoj | „ | 201·65 |
| kongresejoj | „ | 193·— |
| diversaj | „ | 423·— |
| libropremioj | „ | 1.080·— |
| resto | „ | 114·30 |
| | Sumo Kč | 4.027·50 |

## Ĉeĥoslovaka literaturo en esperanto.

Por kompletigi la ekzistantan nomaron pri esperantaj tradukoj el ĉeĥosl. literaturo, ni petas la legantojn, ke ili bonvolu traserĉi esperantajn gazetojn

kaj librojn krom la sube notitaj kaj nin informi pri ĉiu tradukaĵo el ĉeĥa aŭ slovaka lingvo, kiun ili trovis. Oni anoncu al ni: nomon de la verkisto, titolon de la verko, nomon de la tradukinto, n-ron kaj paĝon de la gazeto aŭ paĝon de la libro, kie ĝi estis enpresita. Ni eventuale publikigos tiun nomaron.

Ni havas ankaŭ intereson pri ĉiu traduko el ĉeĥoslovaka literaturo, kiu ne estis ankoraŭ publikigita. Pri ili bonvolu indiki: titolon, nomojn de la verkisto kaj tradukinto kaj lokon, kie kuŝas la manuskripto. Ankaŭ pri tiuj manuskriptoj ni volas informi niajn legantojn en la espero, ke ni tiel eventuale ŝparos al iu samideano neutilan laboron. (La verko „Psohlavci" de Jirásek estis tradukita kvarfoje!) Ankaŭ ni ŝatos aŭdi pri tradukoj jam pretaj, sed ne publikigitaj ankoraŭ.

Ni donas ĉi tie nomaron de gazetoj jam esploritaj. En ĉiuj ceteraj bonvolu do serĉi kaj informu nin pri rezulto de via serĉado.

Časopis českých esperantistů I.—VIII., Český esperantista I.—VI., Literatura mondo 1923—1932, Progreso I.—VI., Esperanto de UEA ĝis 1921, La Kulturo I.—III., Nova Eŭropo (Ĉeĥoslovaka Gazeto) n-roj 1—14, La Revuo — tuta, Germana Esperantisto 1921—22, Espero Teozofia II.—III., Lingvo Internacia XI., XII., XIV.—XIX., Juna Esperantisto IX.—XI.

Libroj esploritaj: Bohemaj grenatoj, Fundamenta Krestomatio, El parnaso de popoloj.

*Literatura komisiono de ĈAE.*

---

# Esperantista vivo.

**Josef Bělohlav**, konata ĉeĥoslovaka geografo, mortis. Li naskiĝis 6. III. 1882 en Bavorov. Dediĉis sin precipe al kartografio. Aperigis ĉe F. Topič 43 landkartojn pri ĉeĥaj landoj en skalo 1/75.000. Li eldonis ankaŭ en jaroj 1910—1914 40 kajerojn de Vlastivědný sborník kun esperantlingva subtitolo „Instrua kolekto pri bohemaj landoj". La kajero enhavis ĉ. 20 foliojn de bildoj el la koncerna urbo aŭ regiono, unu landkarteton (1/100.000) kaj unu aŭ du paĝojn da klariga teksto ĉeĥa. La subskriboj sub la bildoj estis en la ĉeĥa kaj en esperanto, la enkonduka teksto estis en kelkaj kajeroj ankaŭ krom en ĉeĥa en esperanto. Ĝi estis tiam tre pionira entrepreno, la aranĝo de la kajeroj same kiel la enmeto de esperanto. En la respubliko li laboris por fervoja ministerio. Estas de li la detalaj landkartoj pendantaj sur stacidomoj. Ankaŭ por higien-ministerio li laboris en fako de propagando por ĉeĥoslovakaj banlokoj. Ĉiam li estis favoranto de nia lingvo, kiun li sciis sufiĉe funde. Li mortis ankoraŭ juna 25an de marto 1935.

**Franz Ullrich**, fervora samideano el Sloup, diligente laboranta jam depost multaj jaroj, mortis 19. V. 1935. Multnombraj amikoj akompanis liajn terajn restaĵojn.

**Karel Loveček**, pioniro de nia afero en Holešov, mortis 22. V. 1935 subite en sia kvardeka jaro. Antaŭ nemultaj monatoj li korespondis kun ĈAE kaj prezentis belajn planojn, kies efektivigon li preparis. Bona homo, kies memoron konservos ĉiu, kiu lin konis. La esperantistaro en Holešov perdis en li fidelan samideanon. Honoron al lia memoro!

**Edziĝo.** Nia fervora kaj aktiva membro Frant. Bárta edziĝis 8-an de junio kun f-ino Zlatuška Grusová en Košice. Li akceptu nian sinceran gratulon!

---

## Diversaĵoj.

La himno esperantista **La Espero** kun muziknotoj por piano nun havebla ĉe Libroservo de ĈAE. Prezo Kč 2·50 afrankite.

**Ĉu vi portas insignon esperantan?** Estas unu el la gravaj devoj esperantistaj kaj tamen facile plenumebla. Libroservo de ĈAE povas liveri malmultekoste insignojn de tre diversa speco. Postulu specialan liston, kiu nun aperis. (Kiu jam mendis la liston, ricevos ĝin nun).

Malofitaĵo — valora libreto **El la historio de Esperanto** ĉe ni nun havebla en kelkaj ekzempleroj. Enhavas la faman leteron de Zamenhof al Borovko pri deveno de esperanto kaj la paroladojn de Zamenhof kaj de Kabe en la Boulogna kongreso. 32 pĝ. 11x17 cm. Por Kč 2·50 afr. liveras al la membroj Libroservo de ĈAE.

**Kiu ne povas aktive kunlabori** en la movado, helpu la propagandon de nia lingvo per disvastigo de la nova impresa flugfolio *Jeden jazyk pro celý svět.* Sur siaj 8 paĝoj ĝi enhavas ĉion direndan pri la movado. Por Kč 20·— liveras 100 ekz. afrankite Libroservo de ĈAE. Zorgu pri la disvastiĝo de la flugfolio aŭ sendu al ni la adresojn de viaj konatoj kun 1 Kč por ĉiu nomo kaj ni liveros al ili rekte tiun presaĵon kun aldono de la Ŝlosilo de esperanto.

**Novaj glumarkoj kun ĉeĥoslovakaj kasteloj** estas haveblaj ĉe Libroservo de ĈAE. 100 ekz. en 8 diversaj specoj Kč 5·20 afrankite.



**Se vi vojaĝas en Francion,** uzu la servojn de la Vojaĝoficejo Orbis, 5, rue de la chausée d'Antin, Paris IX. Ĝi prizorgos por vi plej oportune ĉiujn vojaĝbiletojn, hotelon, gvidon tra la urbo, monŝanĝon ktp. Oni korespondas kaj parolas en la oficejo esperante.

**Diapozitivojn** alvokantajn al lerno de esperanto kaj aliĝo al loka grupo ni povos liveri malmultekoste (Kč 32·— 1 ekz. afrankite), se mendos pluraj grupoj. Bona propagando por la aŭtunaj kursoj. Ni atentigas, ke la diapozitivoj estos unuformaj kaj ke ne enestos tial detala adreso de la loka grupo. Skribu baldaŭ al Libroservo de ĈAE, kiu anoncos en venonta numero, ĉu la diapozitivoj estas haveblaj.

**Poŝtkartoj kun terglobo kaj stelo** estas disvenditaj kaj ne plu estos haveblaj. Post paso de la somero ni eble povos proponi aliajn poŝtkartojn.

**Ĉeĥoslovaka Antologio** estas jam plurajn semajnojn preta, sed ne povis esti ekspedata pro neatenditaj malfacilaĵoj. Estas postulata tro alta dogano por la ilustraĵoj presitaj en Ĉeĥoslovakio. La eldonejo streĉe klopodas ordigi plej rapide la aferon.

## Ricevitaj libroj kaj gazetoj.

Librojn, ĉe kiuj estas notita prezo en Kč, liveros la Libroservo de ĈAE afrankite por la notita sumo.

*Historio pri la skismo en la laborista Esperantomovado.* Eldonis Sennacieca Asocio Tutmonda, 67, avenue Gambetta, Paris. 20 pĝ 13x21 cm. Prezo 2 fr. fr., ĉe Libroservo Kč 3·40 afrankite. — La broŝuro priskribas la okazintaĵojn gvidintajn al la bedaŭrata malfortiĝo de la laborista esperanto-organizo. Interesa enhavo por ĉiu serioza studanto de la movado.

*La juna vivo*, West Graftdijk N. H., Nederlando. La bona junulara gazeto prezentas sian jarkolekton (23 nroj, 196 pĝ. 15x23 cm) en plaĉa volumo riĉe ilustrita. Prezo Kč 15.— afr. Mendu ĉe Libroservo, kiu akceptas ankaŭ abonon (tutjare Kč 16·50) por tiu ĉi tre rekomendinda dusemajna revuo.

El *Bulgara Esperantisto*, nro 7-8 (marto-aprilo) ni citas: Al germanaj samideanoj ofte ĝenantaj nin per presaĵoj ni afable respondas: Ne fariĝu ridindaj — nenie ekzistas pura raso hodiaŭ, ĉio estas miksita! Tiu ĉi malmulto nun sufiĉu al inteligentuloj.

*The British Esperantist*, la veterano inter niaj gazetoj, aperanta jam tridekan jaron, bonvolu pardoni, se nia unua raporto pri ĝi tuŝas du erarojn aperintaj en ĝia aprila kajero. Parolante pri la nova Zamenhofa rozo, B. E. metas la urbon Praha en Aŭstrion forgesante pri ekzisto de Ĉeĥoslovaka respubliko kaj ĝia ĉefurbo Praha, la urbo de la XIII-a. Kaj ĉiuj skoltoj konas sian devizon. La ĉeĥoslovakaj skoltoj diras *Buď připraven*, sed tio ne estas en lingvo estona, kiel malĝuste supozas nia brita kolego, sed en lingvo ĉeĥoslovaka.

*Alois Pajkr: Cesta k radosti a štěstí.* Protivín. 222 pĝ. 20x15 cm. Kč 10·— afr. — Instiga verko kondukanta al interna ekvilibro kaj tiel al kontento. Ĝia deka ĉapitro „La sonĝo de la estonteco" parolas pri la tasko, kiun ludos esperanto en estonta socio.

*Hungara Heroldo* en sia dua kajero (52 pĝ.) alportas interesan biografion de Zamenhof, represon el la ĵus finpresita dua volumo de Enciklopedio de Esperanto. Interesa estas ankaŭ la cetera enhavo de la revuo. (Adreso: Budapest X., Pongrác-út. 17.) Jara abono 3 sv. fr., dua kajero 3 rpkup.

*Esperanto*, plejparte svedlingva gazeto, eldonata de la Laborista Esperanto-Klubo en Malmö. Anoncas la fondon de esperantista asocio Leviĝu (adr. Tage Lau, Kjeldsgaardsvej 33, Kopenhago), kiu celas propagandon de Kvara Internacio inter esperantistoj.

*Wij*, tre bela nederlanda revuo ilustrita, aperanta en Amsterdam, Hekelveld 15, havas sur unu el siaj paĝoj sub la titolo „Wij rigardas trans la limon" esperantajn klarigojn sub la bildoj. La redakcio akceptas por tiu paĝo fotojn, sed sole vere bonajn kaj interesajn.

**Korespondado kun ĈAE.** Ni petas, ke vi direktu ĉiujn viajn korespondaĵojn por ĈAE senescepte al la adreso de nia centra oficejo en Praha XIX., Uralské nám. 447, kiu ĝin transdonos al la koncernaj sekciestroj. Petante respondon almetu laŭeble poŝtmarkojn kaj eble ne estas troa nia postulo, se ni vin petas, ke vi tiam ankaŭ kontrolu, ĉu vi pagis vian kotizon. Tro ofte venas al ni petoj pri malfacilaj informoj aŭ intervenoj ankaŭ de nemembroj.

Stampilon kun via adreso 50x13 mm por 16 Kč liveras afrankite Ĉ. A. E.

Nova romano de JULIO BAGHY:

SUR SANGA TERO

Daŭrigo de „Viktimoj".
Ĉiu verko de Baghy estas sensacio en la esperanta literaturo.
Por Kč 34·— afrankite prizorgas
Libroservo de ĈAE.

Vychází 6krát do roka. — Vydavatel: Svaz čsl. esperantistů v Praze XIX., Uralské n. 447. — Zodpovědný redaktor Fr. Slavík. - Tiskne A. Pražák, Jablonné n. O. - Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze, č. 102.047-VII-1933. - Podací úřad Praha 45.